Dimitrije Janičić

# SIGNALISMO – PLANEDA ARTO

Signalismo (lat. signum=signo) estas internacia, neoavangarda litiraturarta movado. Ĝi estiĝis en serba kulturo meze de pasintjarcento. Komencoj de tiu movado ligiĝas al la jaro 1959. Tiun jaron fondinto kaj teoriisto de la movado Miroljub Todorović komencis eksperimentojn en lingvo asertinte ke ne povas ekzisti revolucio en poezio sen ŝanĝoj en lingvo – baza rimedo de poeta esprimado.

Signalistoj opiniis ke oni bezonas ŝanĝi manieron de esprimado ne nur en literaturo, sed ankaŭ en filmo, en pentroarto, teatro kaj muziko. Kultura tradicio en tiuj artoj estas eluzita, oni devas respondi al novaj postuloj de planeda unuiĝo, nuntempa tehnologia kaj elektronika revolucio. Oni devas ĉesigi kun principoj nova romantismo kaj malfruiĝinta simbolismo en enhavo kaj formo – asertis signalistoj.

Ŝanĝo de la lingvo de poezio komencis per sciencismo – per enportado simboloj, formuloj kaj leksemoj el ekzaktaj sciencoj (fiziko, kemio, matematiko, astrofiziko k.s.) kaj vizualigo de teksto (grafika diserigo de vortoj kaj enportado de neverbaj signoj en tekston (kolaĵoj, grafikonoj, fotoj, desegnaĵoj). Tiamaniere en jaroj post tio fariĝis du specoj de poezio – verba kaj neverba. Verba poezio disiĝis en sciencistan, aleatoran, stohastikan, tehnologian, fenomenologian, friponan kaj apera. En neverba poezio ekzistas videbla, objekta, sonora kaj gesta poezio. Tiel diras la signalistoj. Ili aperigas internacian revuon "Signal".

– Signalistoj havas multajn kunlaborantojn el la mondo (Germanio, Francio, Britio, Usono, Pollando, Italio, Urugvajo, Rusio, Japanio, Belgio, Ĉilio), tre konataj verkistoj kaj multimediaj artistoj – kiuj provas per poeta, pentraĵa aŭ alia maniero de esprimado montri ŝanĝojn faritajn en nuntempa globa vilaĝo, videble diversan realecon kiun donis al ni informa revolucio – diris sinjoro *Miroljub Todorović*, kreinto kaj teoristo de tiu movado, ĉefredaktoro de la revuo "Signalo".

– Ne forgesu pri signalismo estas defenditaj du doktoraj disertaĵoj (du en Serbio kaj unu en Polando) kaj aperis dudeko da monografioj kaj pli ol du mil artikoloj, recenzoj kaj traktatoj en Serbio kaj en la mondo.

Por profesoro doktoro Miloš Bandić "rigardante literaturhistorie signalismo estas – post zenitismo kaj movado de sociala literaturo – nova kaj sendependa literatura kaj arta avangarda movado en serba literaturo en dudeka jarcento. Samtempe – asertas Bandić – signalismo en nuntempa serbaj literaturo kaj kulturo estas tipa moderna dimensio kiel


aparta arta formo kaj produktado. Sen ĝi, ĉio estus, verŝajne, diversa kaj kiu scias kiom pli malriĉa."

Konata italia estetisto Gillo Dorfles diras ke "signalismo signifas paŝon antaŭen rilate al konkreta poezio, vizuala poezio kaj arto de signo ĝenerale", kaj por kritikisto Zoran Markuš "signalismo estas nia paralela fenomeno en la plej ekstrema avangardo, inter alie, tio klarigas ĝian internacian larĝigon, rekonon kaj gravecon en artaj kaj intelektulaj medioj".

Interese estas ke novaj tipoj de signalismo estiĝas depende de socia kaj teknologia disvolvo kaj, ekzemple, unu el tipoj de pentraĵoj estas monde konata kiel "mail-arto".

Jen unu hibrida verbala-vizuala verko, esperantigita por pli facila kompreno. Pli granda vorto "amo" estas konstruita de multnombraj vortoj "amo" kaj poste renkonto de tri vortoj "amo" – faris – geedzan triangulon. Ĉio estas klara, sed signalistoj ne klarigas la signifon de la grafiko, oni lasas al ĉiuj – trovi la signifon.

Kiu aparte interesas tiu novavangarda arta movado, li aŭ ŝi  povas trovi multe da informoj (en diversaj lingvoj) ĉe multnomraj paĝaroj kaj ĉe paĝarao de aŭtoro de signalismo http://www.miroljubtodorovic.com.




Димитрије Јаничић: БРАЧНИ ТРОУГАО (GEEDZA TRIANGULO)